Instru-Cirkulero 2
14.04.2005.

Karaj Gekolegoj,

Post programplenaj jarkomencaj monatoj en Interkultura Centro Herzberg (Germana E-Centro, klerigejo de GEA) kaj dusemajna printempa ferio mi sendas al vi gravajn novajn informojn rilate al E-instruado.

-ICH/GEC-NOVAJXOJ:

1. en la aldona raporto vi povas legi mallongan statistikan raporton pri la eventoj okazintaj en ICH dum la unuaj kelkaj monatoj en 2005.
2. En marto dum la 24a Studsesio por estontaj kaj spertiĝemaj E-instruantoj Prof. Erich-D. Krause prelegis pri leksikografio kaj interesaj aktualaj vortuzaj problemoj.
3. En aprilo D-ro sc. Detlev Blanke prelegis kaj gvidis seminarion por germanaj kaj eksterlandaj reprezentantoj de Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj.
4. 30.04 – 05.05. 5-taga E-lingvokurso okazos en ICH en 3 niveloj: por komencantoj, dauxrigantoj kaj konversaciemuloj.
5. 13-16.05. D-ro sc. Detlev Blanke prelegos pri interlingvistiko dum la 25a Studsesio.
6. GEK/Bad König: ebleco por priparoli aktualajn kaj strategiajn demandojn de E-instruado. Mi estos tie. Kaj vi?

-GEA/GEI EKZAMENO pri lingva kapableco okazos en Herzberg inter 15-16. 05. Estas dezirinde, ke tiuj, kiuj serioze okupigxas pri E-o, E-instruado, mem havu atestilojn, konu la postulojn kaj instigu aliajn (montrante bonan ekzemplon) al ekzamenigxo.
Informojn pri la postuloj ni sendos al la interesigxantoj, kandidatoj.
Dum la studsesio ni organizos antauxekzamenan preparkurson, eblas fari ankaux provekzamenan teston. Bonvenon! Aligxojn sendu al mia retadreso gxis 30.04.

-TUTLANDAJ PEDAGOGIAJ TAGOJ: 1-3 oktobro, 2005
Post longa kaj efika korespondado kun ILEI-funkciuloj mi povas nun anonci, ke GEA kaj ILEI kune organizas tiun gravan fakkunvenon. Krom fakprelegoj, konsultigxo, spertintersxangxo okazos du fakkursoj gvidotaj de Stefan MacGill, vicprezidanto de ILEI (situacia instruado) kaj Atilio O. Rojas, sekretario de ILEI (Cseh-instruado).
Detalan informilon pri la programo, kotizoj kaj aligxkondicxoj mi aldone sendas. Kiel regiona mentoro, aktivulo, bv. fotokopiante aux rete plusendante informi pri tio E-istojn, gekolegojn, ktp. en via cxirkauxajxo.
Por ke mi povu pretigi la definitivan programon, bv. kiom eble plej frue anonci vian prelegdeziron (po 30 minutoj), prelegtitolon, bezonon de teknikajxoj, ktp. Dankon.
Ne forgesu la unuan plej favorprezan aligxperiodon: gxis 10.06.2005!

-UEA/ILEI EKZAMENOJ
Ekzamenigxoferto dum la Pedagogiaj Tagoj: plilongigu vian restadon kaj dum la senpagaj postkonferencaj tagoj (4-5 oktobro) eluzu la eblecon kaj akiru internacian ekzamenatestilon en elementa aux meza nivelo. Anoncu vian deziron aligxante en la unua aligxperiodo al la Pedagogiaj Tagoj: 10.06.2005!
Tiuj, kiuj ne povas partopreni GEA/GEI ekzamenon en majo (aux hazarde malsukcesas), denove havos bonsxancon trapasi lingvoekzamenon en oktobro.
Estonte ni sxatus regule oferti ekzamenojn 1-2 foje jare.

Kun multaj salutoj,

Zsofia Korody
GEA-komisiito por instruado: zsofia.korody@esperanto.de